*La 3-a tasko estas: ELDONADO DE INTERNACIA PEK-BULTENO (en esp-o, por eksterlando).* Ĝia enhavo konsistu el:

a) ekonomia stato, okazaĵoj de nia movado;

b) uzinkorespondado (pri ĝi ne nur interesiĝas la koncernaj interrilatantaj uzinoj, sed ĉiuj. Niaj sciigoj estas disaŭdigataj en Sovetiaj radiostacioj, represataj en la laborista gazetaro alilanda, prelegataj dum tagmezaj paŭzoj en Rusiaj fabrikoj ktp. Tial ni korespondu publike pere de niaj PEK-bultenoj).

c) « INTER NI ». En tiu ĉi rubriko ni mencias kiel ni utiligis ricevitan materialon, ni plendas pri ne bone laborantaj korespondantoj, ni postulas certan materialon ktp. (La efiko de tiu ĉi rubriko rilate bonajn k malbonajn korespondantojn pere de laŭdoj k mallaŭdoj estas evidenta).

**Estas memkompreneble, ke por la sukceso de nia laboro ne nur estas necese ke ni mem bone laboru, sed ankaŭ en eksterlando ni bezonas k-dojn, kiuj nian materialon bone utiligu k bone respond(ig)u ĉion.**

Jen ekzistas IPE, Internacio de Proleta Esperantistaro, kiu konsideras kiel sian ĉefan taskon la PEK-laboron. Ĝi havas membrojn sur la tuta mondo, sekciojn krom en Eŭropo eĉ en Azio, Usono k Aŭstralio. Preskaŭ ĉiu el la sekcioj havas almenaŭ unu PEK-filion. Ni nun disponas pri pli ol 50 adresoj de Sovetio, Japanio, Ĉinio, Francio, Britio, Hispanio, Holando, Belgio, Svedio, Danio, Polio, Ĉeĥio, Meksikio, Estonio, Latvio, Grekio, Rumanio, Norvegio, Usono, Svisio, Aŭstralio, Bulgario, Islando k Germanio.

Do, estas ege salutinde, ke ankaŭ nun per PEA fondiĝis organizo, kiu kiel Aŭstria IPE-sekcio plenumas ĝian devon.

# Pri la Unuigaj komitatoj

Anticipe ni jen konstatu, ke en la IPE-statuto ne detale estas klarigitaj la taskoj de la Unuigaj Komitatoj (UK-oj). La tuta pezo de atento estas metita sur la sekciojn. Tiu stato cetere diferencas de la praktiko, kiu postulas sammezuran laborplenumon ankaŭ de la UK. Ĉar en vico da landoj ekzistas UK-oj, ĉar la IPE-konferenco post detala diskuto (speciale rilate la UK-on Nederlandan) substrekis la ekzistorajton de UK-oj, tial do ni devas rompi la malatenton, kiun ni ĝis nun cedis al tiu fako de nia laboro.

Dum la IPE-statuto difinas, ke « IPE konsistiĝas el la landaj, laboristaj esp-asocioj (LEA-OJ), ĝiaj sekcioj » ĝi tamen nur alude mencias, ke « Membro de IPE povas fariĝi... en landoj sen sekcioj *provizore* (substreko nia) la unuigaj k preparaj komitatoj... »

Ne estas mirinde, ke pro tiu aluda karaktero de la statutaj klarigoj pri UK vegetas sufiĉe da malklaro. Verŝajne la malklaro ankaŭ kreas k nutras la tendencon pri organiza memstariĝo kiel « sekcio » tie, kie parte aŭ tute mankas la antaŭkondiĉoj.

Al la necesa vivigo de la Plenum-Komitato de IPE ankaŭ apartenas la partoprenigo de la UK-estraroj en la PK-laboroj. Fakte « Al la PK apartenas la IPE-sekretariaro, la ĉefa gvidanto de ĉiu sekcio... ». Sed mankas statuta mencio, ke ankaŭ la ĉefa gvidanto de UK apartenas al la PK.

Nature, ankaŭ kun la necesaj statut-korektoj la taskoj de UK ne multe klariĝus. Klariĝus tamen la organiza rilato de UK al PK, IPE-C kc, kio signifas, ke reliefiĝus ankaŭ pli konture la taskoj de UK ĝenerale.

La taskoj de UK certe ĝenerale ne diferencas de sekcio. Sed UK, kompare kun sekcio ĉiam havas unu apartan taskon, ne konsiderindan de sekcio: UK devas krei tiun organizan aparaton, kiu poste kiel sekcio aliĝas al IPE k en kiun ĝi (la UK) mem dissolviĝas. En tio konsistas la provizoreco de UK.

Ekzamenante la eblojn pri kreo de organiza IPE-aparato (sekcio) ni devas diferencigi inter landoj kun LEA-oj(1) k landoj sen LEA-oj (2). En landoj(1) ofte UK-oj pro komencaj eraroj aŭ malĝusta labormaniero izoliĝas de tiuj laboristaj esp-istoj, kiujn ili volas influi por si. La sekvo tiam povas esti, ke koncernaj UK-anoj kontentiĝas plenumi taskojn, kiuj apartenas al la ĝeneralaj taskoj en la sekcia laboro (PEK, lingva klerigo, literatura agado ktp), tute forgesante, ke ili devas solvi ankoraŭ la organizan problemon.

Tiu maniero estas komplete malĝusta. Nature UK devas aktivi en la menciitaj fakoj. Sed ĉiuj laboroj devas servi por kontaktiĝi kun la laboristaj esp-istoj el la koncerna organizo. En ĉiujn laborojn devas esti tirataj ne-IPE-anoj. Praktika utiligo de esp-o al la UK-anoj devas doni organizan fundamenton k al la konvinkotaj k-doj komprenon pri IPE-agado. Tiel ebeniĝas la evolua vojo al formiĝo de memstara IPE-sekcio.

La klariga, varba k organiza laboro de UK en landoj (1 + 2) multe estas faciligata per *regule aperanta* UK-organo. Ĝi devas reagi rapide k trafe al aktualaj okazaĵoj, ekzemple al respondo aŭ nerespondo flanke de ne-IPE-organizo al unuecfrontaj proponoj k doni novajn perspektivojn por plua, respektive denova impeto.

En kelkaj UK-oj la malfacilo en la eldonado de la UK-bulteno, nacilingva k esp-lingva PEK-bultenoj kondukas al rezignacia malfunkcio kompleta rilate ĉiujn 3 eldonojn. Tia situacio diktas la ekkonon, ke pli bona estas *io ol nenio*. En similaj kazoj la UK-oj kuraĝe sekvu la ekzemplon de la Svedia UK, kiu aperigas ambaŭ PEK-paĝojn en la UK-bulteno. Sama aranĝo estas rekomendinda speciale al Nederlando k Danio. La organiza k financa fortoj en tiuj UK-oj povas decidi, ĉu oni jes aŭ ne eldonas UK-bultenon k esp-PEK-paĝon kune, por aparte aperigi nacilingvan PEK-bultenon, kiu donas krome enspezeblon.

Per regula aperigo de UK-bulteno eblas pli facile krei kontakton en la tuta lando. La UK-bulteno nepre ne povas anstataŭi la opan korespondadon, sed ĝi ofte estigas kontakton k tute certe helpas daŭrigi ĝin.

**Rilate ĉiujn aluditajn taskojn la UK-estraro ne forgesu momenton, ke ĉiuj ideologiaj bataloj k organizaj entreprenoj ne servas por konstantigi la ekziston de UK. UK-estraro ankaŭ ne frivole devas agiti por memstariĝo kiel IPE-" sekcio ", se la antaŭkondiĉoj ne estas plenumitaj. La ĝusta vojo estas: stabiligi la organizan k praktike-aplikan manovripovon de UK kun la celo, krei antaŭkondiĉojn por organiza memstariĝo (sekcio). En tiu ŝanco UK-estraro mem devas firmiĝi k influi siajn anojn.**

En landoj sen LEA-oj (2) la taskoj ne multe diferencas. En tiuj landoj pro diversaj kaŭzoj ne ekzistas signifaj esp-organizoj k nenie LEA-oj. La UK tie devas iniciati alproksimiĝon kun aliaj organizoj aŭ grupoj, organizi landajn konferencojn por kontaktiĝi kun alitendencaj k-doj k tiel konatigi ilin kun la celo k taskoj de IPE. Ankaŭ rilate tiujn landojn eĉ post ioma ekzameno ni konstatas, ke senpera fondo de IPE-« sekcio » identas kun konstruo sursabla. Unua tasko ĉiam estas fari efektivan UK-laboron, krei kontinuajn apogpunktojn, per regula aperigo de UK-organo dissemi nian ideologion.

Kiom longe, ĝis kia grado UK devas labori tiel? Tio dependas de la aktivo en koncerna UK-mem. Konsilinde estas ĉiukaze, (efektive superflue por aparte atentigi pri tio) ke UK havu daŭran kontakton kun IPE-C, kiu ĉiam povas doni laŭcirkonstancajn direktivojn.

La UK-anoj en siaj landoj ĝenerale estas la pioniroj de la IPE-movado. Ni dediĉu pli da atento al tiuj pioniroj, tiel rilate organizan rajtigon k konforman aktivigon, kiel rilate k-decan konsiladon k praktikan helpon.

R

## LA TORFSOLDATOJ

**SLEA-aktivisto (Svedio) en Junia n-o 1935 informas, ke la kanto « La Torfsoldatoj » estas tradukita el esp-o en la svedan lingvon. Samloke ankaŭ estas publikigita la traduko svedlingva mem.**

**Alia ekzemplo de peresp-a populariĝo de proletkantoj estas la anglalingva traduko de « Marŝo de la ruĝaj aviadistoj ». Britiaj PEK-oj tradukis tiun kanton el esp-o en la anglan k aperigis ĝin en « Contact » n-oj 4-5 (Januaro-Februaro 1934).**

# IPE kreskas nekontesteble!

Indekso de landoj, kie IPE havas organizojn. Inter parentezoj () la adresoj de la koncerna organizo. Ciferoj signifas titolon de: [1]) landa IPE-organo, [2]) esp-PEK-organo, [3]) nacilingva PEK-organo. Mankantajn adresojn komunikas IPE-O.

1) **Aŭstralio**
Aŭstralia Laborista Esp-Asocio (F. P. Owen, Box 2355, GPO. MELBOURNE C 1).
[1]) Laborista Esperantisto.

2) **Aŭstrio**
Proleta Esperantistaro Aŭstria, PEA.
[1]) Informoj de PEA-Centro, [2]) Aŭstria PEK-bulteno, [3]) Ĉie klasbatalo.

3) **Belgio**
Belgia UK (« Pannenhuis », Consscienceplein, Antverpeno).
[1]) + [2]) kombinitaj: Belga Proleto.

4) **Britio**
Britia Laborista Esp-Asocio BLEA (S. J. Smith, 36 Womersley Road, London N 8).
[1]) Ruĝa Esp-isto, [2]) PEK-bulteno-Britio, [3]) Contact (presita ĵurnalo).

5) **Bulgario**
Bulgaria Laborista Esp-Asocio.
[1]) Lumturo, [2]) + [3]) Ŝturmulo k aliaj.

6) **Ĉinio**
Ĉinia UK.
[1]) + [2]) kombinitaj: La revuo.

7) **Danio**
Dania UK (Eiler Carlsen, Christiansgade 15, ODENSE).
[1]) + [3]) kombinitaj: DUK-Bulteno.
[2]) Ruĝa Proleto.

8) **Francio**
Federacio de Esp-istoj Proletaj, FEP (Bourse du Travail, 14 rue Pavée, NIMES, Gard).
[1]) Proleta Esperantisto, [2]) PEK-Bulteno-Francio, [3]) Liaison Internationale (Ligo Internacia).

9) **Germanio**
Germania Laborista Esp-Asocio, GLEA.
[1]), [2]), [3]) diversaj kombinoj.

10) **Hispanio-Kanariaj Insuloj**
UK.
[1]) + [2]) reapero preparata, [3]) utiligo de diversaj gazetoj.

11) **Islando** (A. Einarsson, Postbox 57, REYKJAVIK).
[1]) preparata.

12) **Japanio**
Japana Proleta Esp-Unio, JPEU.
[1]) Sennomulo, [2]) PEK-Bulteno.

13) **Latvio**
Diversaj rondoj.
[2]) Ruĝa Informilo.

14) **Nederlando**
Nederlanda UK (L. Van Duin, Van Ostadestraat 390 hs. AMSTERDAM)
[1]) Ruĝa Batalanto, [2]) PEK-Bulteno, [3]) De Informatie (La Informo).

15) **Norvegio**
Norvegia UK (Boks 2001, OSLO).
[1]) La Proleto.

16) **Sovet-Unio**
Sovetlanda Esp-ista Unio, SEU (Spiridonovka 15, MOSKVO).
[1]) + [2]) kombinitaj: Sur Posteno Klasbatala, SPK.

17) **Svedio**
Svedia UK (O. Boman, Munkebäcksgt. 5-7, GOETEBORG).
[1]), [2]), [3]) kombinitaj: SLEA-Aktivisto.

18) **Svisio**
Svisia UK (Postbox 21, BERN-6).
[1]) Batalanto, [2]) Svisia PEK, [3]) Der rote Spiegel (La ruĝa spegulo).

19) **Usono**
Nordamerika Laborista Esp-Asocio, NALEA (R. Bonesper., P.O. Box 101, Station K, NEW YORK CITY)
[1]) Informilo, [2]) + [3]) ne aperas.



*ANTAŬ 3 jaroj:* fondkongreso de IPE en Berlino (20-25.8.1932). Ĉeestis 348 gek-doj el 11 landoj, inter kiuj estis 46 gedelegitoj de sekcioj k UK-oj.

**Sen "Sur Posteno" ŝip' sen kompaso**
**Abonu, abonigu, varbu!**

## La Sovetia Akademio de Sciencoj antaŭe k nun

Ĝis nun la burĝa gazetaro neniam ĉesas aserti, ke la « bolŝevismo » signifas pereon de l'kulturo k civilizo.

Tial kun granda intereso ĉiu proleto ekscios kelkajn karakterizajn faktojn pri la evoluo de l'Akademio de Sciencoj en Sovetio.

En la j. 1912 la « Rusia Imperia Akademio de Sciencoj » enhavis 14 sciencajn institutojn k 8 akademiajn komisionojn. En la jaro 1934, la Sovetia Akademio de Sciencoj entenis 37 institutojn, 22 bibliotekojn, 11 memstarajn laboratoriojn, 3 botanikajn ĝardenojn, observatorion, 16 scienc-komisionojn, 3 scienc-konsilantarojn, 4 scienc-komitatojn kaj 48 sciencajn staciojn en la periferio de la lando. La agado de tiuj 145 sciencaj institutoj estas unuigita en 5 asocioj.

La « Imperia Akademio » sidis en S. Peterburgo. Male, la Sovetia Akademio krom siaj centroj en Moskvo k Leningrado (k la 48 sciencstacioj en la periferio) havas filiojn en Ekstrem-Oriento, Ural-regiono, Transkaŭkazio (la transkaŭkazia filio konsistas el du subfilioj: kartvelia k azedbejĝana), Tagikistano k Kazakstano. Ukrainio k Blankrusio havas siajn propajn Akademiojn de Sciencoj, ĉiu kun aparta sistemo de institutoj, laboratorioj k. t. p.

La Sovetia Akademio de Sciencoj havas 88 akademianojn, el ili 17 estas anoj de l'komunista partio; krom tio ĝi havas 176 membrojn korespondantojn k 116 ekster Sovetio. En la senpera laboro de l'Akademio k de ĝiaj institutoj partoprenas 3211 kunlaborantoj.

Por fini tiun komparon estas ne malpli interese komuniki pri la buĝeto de l'Akademio dum carismo k nun ĉe la soveta reĝimo. En la jaro 1913 la buĝeto de l' « Imperia Akademio » egalis 1 milionon da rubloj. En la jaro 1934 la buĝeto de l'Sovetia Akademio de Sciencoj egalis 35 milionojn da rubloj.

El SPK.

**Kie vi loĝas?**

Aho, aho!

K-dino Z. Gorohovskaj, Sovetio, sendu al ni vian precizan adreson. Ni havas leteron por vi de ĉinia korespondanto Ĉ. J.

IPE-O.

**La Kritiko**

## Pri neologismoj

*SP laŭ ni lingve ankoraŭ estas tro malfacila. Estu lingva angulo k severa kritiko al EKRELO-eldonaĵoj laŭ lingva vidpunkto. Kritiku la emon enkonduki neologismojn. Legante proletan literaturon kun neologismoj ni kontraŭneologismanoj eĉ ekuzas ilin senkonscie. Ekzemple anstataŭ « neleĝe » oni uzis « nelegala » k tio certe konfuzas la enlandajn legantojn, kiuj scias neniun eŭropan lingvon. Kaj neologismo ĉiam vekas abomenon ĉe komencantoj. Estas urĝe necese eldoni teknikan terminaron. Sen ĝi grandskala korespondlaboro ne estas ebla. Tiurilate ni nur povas esperi, sed neniel helpi. Ĉinio ja estas industrie postrestanta lando k eĉ en nia nacia lingvo ne estas perfekta, teknika terminaro. Ĝenerale ni orientaj k-doj multe pli alte taksas nian lingvon k do multe esperas de eŭropaj k-doj pli energian k pli praktikan laboron.* Ĉ. Ĉ. Ŝanhajo.

*Al la 2-a IPE-Kongreso*

### SALUTLETERO DE LA AŬSTRIA IPE-SEKCIO

La plej nova, ĵus fondita IPE-sekcio, PEA okaze de la 2-a IPE-Kongreso sendas al vi siajn k-decajn salutojn, ege bedaŭrante, ne povi sendi delegiton por intime partopreni la gravan akcelan laboron de ĝi.

Ke eĉ dum regas faŝisma teroro ĉilande ni preparis k sukcese komencas firmigi nian movadon, tio konvinku vin, ke komprenplene ni taksas la taskojn, kies nepran plenumon nia Internacio skribis sur sian standardon.

PEK, kun rajto nomata « Baza ŝtono de IPE » ankaŭ niaopinie kiel ununura, vere efika porsocialisma batalilo esp-a estas plivastigenda. Kontribuu do nia ĉijara kongreso al la daŭra pliampleksiĝo de l'reto de niaj kolektivaj korespondantoj, por ke la proleta vero ĉie konatiĝu!

Al niaj salutoj ni emas enplekti deziron kroman: la kongreso daŭrigu entrepreni ĉion fareblan por krei la unuecan agadon inter la laboristaj esp-istoj.

Vivu la 2-a IPE-Kongreso!
Vivu la laboristesp-ista unuecfronto!
Vivu IPE!
Ĉiuj sur postenon!

Por PEA-Centro:
sig.: G. L.

# TRA IPE-KOLONOJ

## AŬSTRIO

### Fondiĝis IPE-sekcio Aŭstria

9-10.6.35 okazis la fondkongreso de Aŭstria IPE-sekcio (Proleta Esp-istaro Aŭstria, PEA). Ĉeestis delegitoj el pluraj, gravaj industrilokoj. Foresto de reprezentantoj el Stirio k S. estas senkulpigita. Pro urĝa forveturo de unu k-do la daŭro de la konferenco, antaŭe fiksita je 2 tagoj estis koncizigita je 1 tago.

Estis alvenintaj salutleteroj de britiaj k-doj, de Nederlanda UK, de Dania UK k de IPE-O.

K-do parolis revue pri UEA-SAT-IPE. K-do el Vieno citante el burĝaj gazetoj priparolis la nunan staton de UEA. Li skizis la despotemon regantan en UEA, la ĵaluzon degenerintan al personaj intrigoj.

Sekvis raporto de l' k-doj el aliaj lokoj pri stato de aliloka esp-movado. La konferenco pozitive difinis la pozicion al IPE, kies sekcio estas PEA, al SP, kiun PEA agnoskas kiel oficialan, centran organon internacian, al EKRELO k al la 2-a IPE-kongreso.

La decidoj, ankaŭ pri la gvidrezolucio estis unuanimaj. La centra organo de PEA estas « Informoj ». (Legu artikolon « PEA fondita ».)

## BELGIO

### Unua konferenco de Belgia UK en Antverpeno, 11.8.35.

La belgiaj proletesp-istoj preparas sin por du tre gravaj kunvenegoj samtempe. Ili ne sole devas organizi la 2-an IPE-kongreson, al kiu ili fervore partoprenos. Per tuta forto ili ankaŭ preparas la unuan konferencon de la Belgia UK.

La movado en Belgio naskiĝis en Antverpeno, kie dum la vintro de 1933-'34 kelkaj laboristaj esp-istoj decidis fondi novan, esp-istan grupon, malgraŭ la ekzisto de 10 aliaj grupoj diverstendencaj, kies plimulto tamen estis burĝa.

Post longa laboro laboristaj esp-istoj kunvenis unuafoje la 6-an de Marto 1934 por fondi la laboristan esp-grupon « Solidareco ». Rapide la grupo disvastiĝis k baldaŭ havis 20 membrojn. En Julio de la sama jaro oni decidis aliĝi al internacia organizo. Unuanime estis decidite aliĝi al IPE, kun kiu tuj la rilato estis starigita.

1-an de Julio « Solidareco » fariĝis IPE-grupo. Unu monaton poste ni sendis delegiton al la IPE-konferenco en Lille, kie oni ŝarĝis la grupon en Antverpeno per la organizado de la 2-a IPE-kongreso. Dum Aŭgusto la Antverpenaj IPE-anoj fiere montros, ke ili plenumis tiun malfacilan taskon pli sukcese, ol iu kuraĝis esperi.

La 1-an de Oktobro 1934 estis eldonata la unua n-o de « La Belga Proleto », organo de la belgiaj IPE-anoj, en kiu oni jam povis raporti pri unueca fronto inter « Solidareco » k la Antverpena sekcio de Nederlanda Federacio de Laboristaj Esp-istoj.

De « Belga Proleto » estis eldonataj 100 ekzempleroj, kiuj atingis 16 landojn. Ĝis tiam ĝi regule aperis monate k nun estas eldonataj 200 ekzempleroj dissendataj al 20 landoj.

Novaj membroj estis varbataj en multaj lokoj de la lando. Kun diversaj esp-grupoj k organizoj ni amike interrilatis. Simpatiantaj laboristaj organizoj kunlaboris kun la IPE-movado, por kiu ili malfermis la paĝojn de siaj gazetoj.

La vendadon de SP, antaŭe ne vendita en Belgio oni komencis per 10 ekzempleroj. Sed la nombro ĉiam kreskis k ĝi nun atingis 160 ekzemplerojn, el kiuj Antverpeno postulas sola 50.

*La provizora estraro de BeUK decidis okazigi ties unuan konferencon. Ĝi alvokas ĉiujn belgiajn IPE-anojn k proletesp-istojn partopreni ĝin. Dum la konferenco oni klopodos elekti definitivan estraron k respondecajn perantojn por PEK k SP. Estos akceptataj novaj labormetodoj k statutoj k pri ĉiuj demandoj antaŭe estos detala diskuto. Estos konstruata taŭga fundamento por ankoraŭ pli efike disvastigi la IPE-movadon en la lando.*

Vivu la konferenco de la Belgia UK !

Por pli detalaj informoj turnu vin al : UK, Belgio, « Pannenhuis », Conscienceplein, Antverpeno, Belgio.



**Ĉie klasbatalo**
Demonstracio de laboristoj en Las Palmas

## KANARIAJ INSULOJ

### La IPE-laboro progresas

Koncize ni raportos pri nia organiza laboro. Ni jam starigis diversajn interligojn. Jam ni kontaktigis la Metalsindikaton kun sovetia Aŭtomobilfabriko « Gorki ». Ankaŭ piedpilka klubo skribis al sovetia Fizikkultura Instituto Lignista sindikato kiel ĉiuj, unuanime konsentis korespondadi kun sovetia. samprofesia kolektivo.Instruista sindikato e nsia ĉijara kongreso ankaŭ decidis korespondi kun sovetianoj k krome rekomendis al siaj anoj korespondi individue. Ĉiuj sindikatoj unuanime voĉdonis por la korespondado k ĉiuj estas diverstendencaj. En ili estas komunistoj, socialdemokratoj, anarkistoj k senpartiuloj. Sur nia insulo nome la sindikatoj estas unuiĝintaj.

Por nia organizo ni tradukis k publikigis 5 individuajn leterojn k multan materialon el aliaj gazetoj. Germanian PEK-bultenon ni tradukis komplete, escepte de unu artikolo. El Latvia k Britia bultenoj ni utiligis kelkajn sciigojn k artikolojn. El SPK aperis tradukaĵoj. El « Soveta Lernejo » jam aperis tradukaĵoj k baldaŭ aperos aliaj en instruista organo.

Ni ankaŭ aranĝis monkolekton por eldoni nacilingvan bultenon. Pli ol la duonon de la necesa sumo ni jam kolektis. Ni intencas eldoni la organon en 1000 ekzempleroj presitaj. (El la raporto ne klariĝas, ĉu niaj kanariinsulaj amikoj eldonos nacilingvan, organizan organon aŭ nacilingvan PEK-bultenon. Ĉu ne eblas kombini ambaŭ ? IPE-O.)

## NACIA KONFERENCO DE BLEA

La Nacia Konferenco de BLEA okazis Junion 9-10 en Londono. 29 membroj ĉeestis, k 5 Filioj sendis delegitojn. Kvankam la ĉeestantaro estis pli malgranda ol ĉe antaŭaj konferencoj, estis certe unu el la plej bonaj BLEA-Konferencoj kiuj iam okazis. Regis sincera deziro plibonigi la laboron k altigi la labor-kvaliton ĉe malfortaj flankoj.

Frataj salutoj estis ricevitaj de IPE-Centro, IPE-Oficejo, SEU, Redakcio de « Pravda Severa » Archangelsk, k BLEA Filioj en Urboj Stirling k Glasgow. **Frat-delegitojn sendis « Amikoj de Sovet-Unio » k Londona Grupo de SATEB.**

Aldonaj raportoj estis legitaj. Tiu de la Sekretario informis, ke la ĝisdata membrocifero sumas 220. Tiu de la PEK-Centro estis longa dokumento kun analizo de l' atingitaj ciferoj en ĉiuj fakoj de PEK-laboro, k multe plialtigitaj planciferoj por venonta jaro. Tiu analizo montris, ke la nombro de kolektivaj korespondoj dum periodo de 11 monatoj estis 42. Artikoloj por la PEK-Bulteno k por la eksterlanda jurnalaro utiliĝis 92. Disvendo de la enlanda PEK-Bulteno «Contact« estas nun 2,200 monate. La sugestitaj planciferoj por venonta jaro estas : PEK-artikoloj : 216 ; kolektivaj korespondoj : 115 ; disvendo de « Contact » atingu en la fino de la jaro 4.000 monate.

La Ekzekutiva Komitato antaŭmetis gvid-rezolucion, kiu koncernis ĉiun flankon de BLEA-laboroj. Ĝenerala diskuto sekvis laŭ ordo de la paragrafoj de la gvid-rezolucio. *Paragr. 1* konstatis la pliakriĝantan danĝeron pri milito k faŝismo k emfazis la neceson por la Laborista Esp-a movado doni praktikan servon en la klasbatalo en plej eble unueca kontakto kun la revolucia laborista movado. *Paragr. 2* temis pri PEK. La diskuto estis vigla k konkreta. La devizo devas esti : « Ĉiu membro estu PEK-laboranto ». *Paragr. 3* konstatis malsukceson varbi novajn membrojn, k akceptis la taskon konsiderinde kreskigi la anaron. *Paragr. 4* temis pri la laboro de

## 2-a IPE-Kongreso, 10-15.8.35, Antverpeno, Belgio.

**GRANDA, ESP-ISTA EKSPOZICIO** en la kongresejo (7-an, 8-an, 9-an de Aŭgusto 1935). La ekspozicio estos vizitebla de la 10-a h. ĝis la 22-a h. seninterrompe. Eniro senpaga.

**10.8.1935.**

**1-a kongreskunsido — komenco: 9.30 h.**
*Malfermo de la kongreso. Oficialaĵoj, salutoj, elekto de prezidantaro k de proponkomisiono.*

**2-a kongreskunsido — komenco: 14.00 h.**
*Stato de la proleta esp-movado k taskoj de IPE en la nuna periodo. (Ideologiaj demandoj, unueca fronto, kontraŭfaŝisma k kontraŭimperialisma agado, rilato al aliaj organizoj.)*

**Publika kunveno — komenco: 20 h.**
*Salutparoloj de diversaj, lokaj laboristorganizoj. Prezentiĝo de la « Esperantista Orkestro » de Lieĝo.*

*

**11.8.1935.**

**3-a kongreskunsido — komenco: 9.30 h.**
*Organiza raporto de la IPE-C. (Agado de IPE-C, de la sekcioj k UK-oj, organizaj metodoj.)*
*Organiza raporto de la IPE-O. (Kompletigoj, administrado, financoj.)*

**4-a kongreskunsido — komenco: 14.00 h.**
*Diskutado. (La diskutado okazu pri ambaŭ raportoj. Samtempe la sekcioj k UK-oj reprezentataj raportas detalojn pri sia agado dum la diskutado.)*

**Konferenco de la Belgia UK.** (Tempo fiksota.)

**Tagmeze.**
*Fotografado de la kongresanaro.*

**Granda Festvespero — komenco: 19.30 h.**
*Salono « Cathedrale », Melkmarkt 25, Antverpeno. Kunlaboras la konata baletistino Lea Daan k ŝiaj dancistinoj, la « Proleta Teatro », ambaŭ de Antverpeno, la « Esperantista Orkesto » de Lieĝo k diversaj, aliaj artistoj. Senpaga eniro por ĉiuj kongresanoj.*

# I P E

kongresafiŝo
Prezo: 6 bel. fr.
Mendu ĉe la KK.




### KOMPLETA PROGRAMO POR TUTA KONGRESDAŬRO

**12.8.1935.**

**5-a kongreskunsido — komenco: 9.30 h.**
*Diskutado. (Daŭrigo.)*

**6-a kongreskunsido — komenco: 14.00 h.**
*Raporto: Serva laboro de IPE. (PEK-agado, peresp-aj paroladoj, kolektiva, laborista korespondado.)*

**Fakkunsido — komenco: 20.00 h.**
*Raporto de Internacia, Proleta Lingva Komisiono (IPLK).*

*

**13.8.1935.**

**7-a kongreskunsido — komenco: 9.30 h.**
*Diskutado.*

**8-a kongreskunsido — komenco: 14.00 h.**
*Propagando k eldonlaboro. (Raporto de SP-redakcio pri landaj IPE-organoj, EKRELO-eldonplano, eldonado nacilingva, metodoj de propagando por esp-o kaj IPE.)*

**Fakkunsidoj — komenco 20.00 h.**
*Lingva laboro k instruado. Komuna kunsido de PK-anoj k proponkomisiono.*

*

**14.8.1935.**

**9-a kongreskunsido — komenco: 9.30 h.**
*Raporto de la proponkomisiono, akcepto de proponoj k rezolucioj, statutŝanĝoj.*

**10-a kongreskunsido — komenco: 14.00 h.**
*Elektado de IPE-instancoj, akcepto de gvidrezolucio, finoficialaĵoj.*

*

**15.8.1935.**

**Komuna ekskurso al Mechelen (Meĥleno)**, *antikva, flandra urbo, 20 km. de Antverpeno kun propaganda manifestacio, kunveno, sonorilar-koncerto k gvidata promenvizito al la lokaj vidindaĵoj.*

*

**Kongresejo:** *Salono « Van Wezenbeke », Van Wezenbekestraat, 11, Antverpeno. La kongresejo estas videbla de sur stacidoma placo. Ĝi troviĝas meze de la urbo. Tuj post alveno en la urbo turnu vin al la kongresejo, kie vi ricevos ĉiun helpon. Respondecaj k-doj kun brakrubandoj ruĝ-verdaj servos ĉe la stacidomoj k sur la kajoj, por konduki la eksterlandajn k-dojn.*

**Grava sciigo.** *La KK insiste petas la kongresanojn, pri ĉiuj organizaj k personaj aferoj (monŝanĝo, manĝo k loĝo) turni sin nur al la respondecaj k-doj en la kongresejo k akurate k rigore submeti sin al ties decidoj. Tiu memdisciplino multe helpos la ordigadon de la kongresirado k samtempe evitos malagrablojn por la partoprenantoj mem.*

## Marŝo de la IPE-anoj

*de Eŭgeno Miĥalski.*

*Antaŭen IPE-anoj,*
*Sub ruĝaverda stel'.*
*" La pacon al kabanoj,*
*Militon al kastel'! "*
*Kun fajra torĉo de ribel'*
*Al la komuna cel'.*

*Ni, idoj de laboro,*
*De krea, homa pens'*
*Akcelu kun fervoro*
*Tra nigra-bruna dens',*
*Por krei ligon en intens'*
*De homlabor' k mens'.*

*Minacas la svastiko*
*Al la kultur' de l' mond'*
*Kaj bruna fanatiko*
*Viciĝas jam sen hont'.*
*Sed sonu laŭte la respond':*
*Proletoj, al ruĝfront'!*

*Perforto, ekspluato,*
*Milito k teror' —*
*Normala estas stato*
*De l' kapital-sinjor'.*
*Sed ni ne ĝemu en dolor',*
*Sed luktu kun fervor'.*

*En la seson' de l' tero*
*Sin regas mem popol'*
*Kaj ĝuas en libero*
*En venka aŭreol'*
*Nur dank' al streĉo de muskol'*
*Kaj komunista vol'.*

*Sub gvido de sovetoj*
*Ekfloras tuta land' —*
*Dum en faŝismaj retoj*
*Sen rajto je demand'*
*Popol' mizeras en konstant'*
*Sub reg' de burĝa band'.*

*Do kresku PEK-laboro*
*En vigla korespond'*
*Kaj pri terur-teroro*
*Per vera PEK-rakont'*
*Vastigu scion tra la mond'*
*En laborista rond'.*

*Ne por leter-amuzo*
*Aŭ por " poŝtmarka rar' "*
*Per esperanto-uzo*
*Kun klasa solidar'*
*Ni agu rekte malgraŭ bar'*
*Por savo de l' homar'.*

*Kaj ĉiu laboranto*
*En ĉiu mondopart':*
*Antaŭen kun la kanto*
*Kaj kun ribela ard'.*
*Antaŭen, brava avangard'*
*Sub ruĝa la standard'!*

Stalino, 22.6.35

*Adreso de IPE-Oficejo, EKRELO, Sur Posteno: Postbox Z 5, Amsterdam-Z. Nederland*

